

BELGA ESPERANTISTO



MONATA REVUO



Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

redaktata de VAN DER BIEST-ANDELHOF, direktoro ;

LÉON CHAMPY, FRANS SCHOofs kaj

OSCAR VAN SCHOOR.

ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)

Eksterlando . . . Fr. 5.— (Sm. 2.—)

Unu numero . . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Tarifo de la reklamoj (Prezo en frankoj)

	1	1/2	1/4	1/8	1/16
paĝo	paĝo	paĝo	paĝo	paĝo	paĝo

1 jaro

(12 n.) 90.— 50.— 30.— 18.— 10.—

1/2 jaro 50.— 30.— 18.— 10.— 6.—

1/3 jaro 40.— 24.— 13.— 8.— 5.—

1/4 jaro 30.— 18.— 10.— 6.— 4.—

1 numero 15.— 10.— 6.— 4.— 2.—

Redakcio. Adreso por ĉio kio koncernas la redakcion (artikoloj, ĉiuspecaj informoj, ĵurnaloj, broŝuroj, libroj) : S-ro VAN DER BIEST-ANDELHOF, 25, Arendstraat, Antwerpen (Rue de l'Aigle, Anvers).

Administracio. (Abonoj, mensend-oj, k. t. p.) S-ro FR. SCHOofs, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen (Rue de la Petite Ourse, Anvers).

Anonco pri korespondado :

kun la numero de la ĵurnalo, en kiu ĝi estas presita : Fr. 0.50.

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.



La Sepo esprimas sian plej sinceran dankon al la multnombraj esperantistaj gazetoj, kiuj vokis la atenton de sia legantaro sur la 7an kongreson, kaj inter ili ĉefe *Holanda Pro-niro*, *Paris-Esperanto* kaj *Universo*, kiuj dediĉis al ĝi specialajn artikolojn, kaj *Germana Esperantisto*, kiu enhavas ĉiumonate regulan korespondadon pri la Sepa. Ĝi ankaŭ estas tre dankema al la *Germana Esperantista Societo*, kiu organizas paroladon kun lumbildoj pri la kongreso, dum la VIa kunveno de la germanaj esperantistoj, okazonta en Lübeck, la 4-an de junio.

— La sekretario-kasisto de la Sepo ricevas multajn leterojn, en kiuj estas petataj ĉiuspecaj informoj. Por ne tro

kompliki ĉian grandan laboron, (ĉar ĉiu demando postulas respondon) li esprimas la deziron ke oni bonvolu atendi la sciigojn presitajn ĉiumonate en «*Belga Esperantisto*». Speciala cirkulero de la Sepo estos dissendata dum la monato marto.

— La prezidanto de la Sepo interparolis antaŭ kelkaj tagoj kun la komitatanoj de la sindikato de la Antverpenaj hotel- kaj restoraciestroj; tiuj sinjoroj promesis fari ĉion eblan por faciligi la restadon de la kongresanoj en Antverpeno kaj transdonos baldaŭ al la organiza komitato informojn pri siaj prezoj. Tiuj informoj estos publikigataj en la marta numero de B. E. kaj ankaŭ en speciala cirkulero.

— Lia dominea moŝto, S-ro A. Van Griethuysen, konsentis fari la predikon en Esperanto dum la diservo okazonta en la evangelia preĝejo, je dimanĉo la 20a de aŭgusto, malferma tago de la kongreso.

— Pri temoj pritraktotaj en la literatura konkurso ni jam povas doni la jenajn informojn:

Organiza komitato de la kongreso. — *Historio de Esperanto*. ± 20 paĝoj, formato de B. E.: 1a premio: 100 frankoj = Sm. 40; 2a premio, 50 frankoj = Sm. 20.

Redakcio de «*Belga Esperantisto*». — *Originala novelo* ± 12 paĝa, formato de B. E. — Premio: 50 frankoj = Sm. 20.

Antverpena Grupo Esperantista. — *Pri la utileco de Esperanto por la komerco; kiel enkonduki la uzadon de nia lingvo en la komercajn rilatojn.* 5 paĝoj, formato de B. E. Premio: 50 fr. = Sm. 20.

La Verda Stelo. — *Subjekto publikigota en la marta numero de B. E.* — Premio: 50 fr. = Sm. 20.

Pliaj detaloj enhavos la sekvonta numero de B. E.; ili estos publikigataj per speciala cirkulero.

Ni faras varman alvokon al la esperantistaj organismoj, ĵurnaloj kaj ankaŭ al ĉiuj bonevolemaj samideanoj, por ke ili difinu temojn kaj aljuĝu premiojn. Ili bonvolu sin turni al la sekretario-kasisto de la Sepo.

— La vendado de «*Kaatje*» mirinde sukcesas. Ni jam anoncis, ke la eldonistoj konsentis cedi grandan rabaton al la kongresa kaso por ĉiuj ekzempleroj venditaj antaŭ la 27a de aŭgusto. Konsekvence la Sepo petas, ke la esperantistoj aĉetu de nun la teatraĵon, mendante ĝin ĉe la sekretario-kasisto, 76, Minderbroedersrui (Canal des Récollets), Antwerpen (Anvers). La mendoj, ne akompanataj de la mono, ne estas plenumataj. La prezentado de «*Kaatje*» estos senpaga, tamen estas ebligata lupreni de nun sidlokojn po Sm. 0.400 (teretaĝo kaj 1a etaĝo), po Sm. 0.200 (2a, 3a etaĝo).

— La kurso malfermita por la Antverpena policanaro, estas sekvata de 14 oficiroj kaj 98 policanoj. Ili estas tre entuziasmaj pri nia movado kaj decidis, ke post kelkaj se-

majnoj ili organizos inter si grupon, kiu aligos la *Internacian Polican Asocion*. Ne estas pridubeble ke dum la kongreso ili faros grandajn servojn kaj ke la sciado de Esperanto estos tre utila al ili por la plenumado de iliaj deĵoraj devoj.

— La Ministro de Sciencoj kaj Artoj metis je la dispono de la 7a kongreso la grandan festalonon kaj ĉiujn ĉambrojn de la teretaĝo de la *Réga Ateneo*, de la 15a ĝis la 31a de aŭgusto 1911.

— La Sepo malfermis konton en la Antverpena *Banque de Reports*.

Van der Biest-Audelhof, prezidanto; **O Van Schoor**, vic-prezidanto; **D-ro W. Van der Biest**, sekretario-kasisto; **Maria Posenaer**, Leŭtenanto **Fr. Dupont**, **Louis Ritschie**, **Frans Schoofs**.

Nomaro de la kongresanoj aligitaj antaŭ la 4a de februaro 1911

339. *Torvaro, esperantista grupo (subskribis 25 fr. = Sm. 10), sekretario*
76, Minderbroedersrui, Antwerpen (Belgujo)
340. Rousseau, Célestin, farmaciisto, 4, pl. de la République,
Levallois-Perrot (Seine-Fr.)
341. F-ino Rousseau, Jeanne, » » »
342. Rousseau, Léon, oficisto, » » »
343. F-ino Rousseau, Marthe, sen profesio, » » »
344. Untermann, Rubin, oficisto, 42, Dahliestraat, Antwerpen (Belg.)
345. Sharpe, Richard, senpaga profesoro de Esperanto, 13, Hesketh Crescent,
Torquay (Devon-Angl.)
346. S-ino Berry, Emily Marion, sen profesio, » » »
347. Bicknell, Clarence, botanikisto, Villa Rosa, Bordighera (Ital.)
348. F-ino Flourens, Villa Roxane, Béziers (Franc.)
349. Maresquellé, Henri, profesoro, 109, rue Isabey, Nancy »
350. F-ino Jozićic, Antonija, instruistino, Kostajnica (Kroat.-Hung.)
351. F-no Soriano, Trinidad, 30, rue Castellar, Sevilla (Hispan.)
352. Doué, Marius, suboficejestro en la Prefektejo, 19, rue Charles Divry,
Paris (Franc.)
353. S-ino Doué, » » »
354. Gossiaux, ekspedisto, 6, von Barystraat, Antwerpen (Belg.)
355. Julia, Jean, novajvendisto, Boulevard St Roch, Cérét (Pyr. Or.-Franc.)
356. S-ino Julia, » » »
357. D-ro Ruiz Prieto, Joaquin, kuracisto, 73, Feria, Sevilla (Hispan.)
358. D-ro Ruiz Frieto, Pedro, » » »
359. Hué, Percy William, ŝipfaristo, 53, Preston Road, Portsmouth (Angl.)
350. Griffin, Alfred, kalkulisto, Gordon Villa, Prescot Road,
St Helens (Lancash. Angl.)
361. Hay, 40, Carstairs street, Liverpool » »
362. Aschy, Joseph, pastro, Southport » »
363. S-ino Stephenson, 19, Lord Street, » » »
364. S-ino Wormald, 31, Talbot Street, » » »
365. F-ino Ferguson, 19, Lord Street, » » »
366. F-ino Hoyle, B. A., 32 Raikes Parade, Blackpool, » »
367. F-ino Hedley, Cath., 7, Upper Queen Street, » » »
368. Eberwein, K., bankoficisto, Ansbach, (Bavar. Germ.)
369. Fafet, Julien, instruisto, 233, avenue Foy, Amiens (Pas-de-Cal.-Franc.)
370. S-ino Fafet, » » »
371. Bontemps, Léon Pierre, Suburbestro, 36, Pl. du Champ de Ville,
Louviers, (Eure-Franc.)
372. S-ino Bontemps, » » »
373. Lannes, Emile, urba kasisto, 9, Faubourg de Rennes, » » »

374. Van de Velde, Jan, negocisto, 28, Geitenstraat, Mechelen (Belg.)
 375. Chauvin, Victor, farmaciisto, 7, rue de Nemours, Rennes, (Ille-et-Vilaine, Franc.)
 379. F-ino Chauvin, » » » » »
 377. Rolland, Joseph, Boulevard Sévigné, 7, rue de Nemours, Rennes (Ille-et-Vilaine, France)
 378. Davies, William-Edwin, lernejestro, Park School, Ireorchy (Rhondda, Kimr. Angl.)
 379. S-ino Smith Nina-Frances, Dunedinstr. Clacton-on-Sea (Essea-Angl.)
 380. F-ino Palmer, Grace Lydia, instruistino, 63, Marine Parade, Clacton-on-Sea (Essex-Angl.)
 381. Jankov, Ksenofon, redaktoro de *Danubo*, Popovo (Bulgarujo)
 382. F-ino Schneller, Hedwig, 16, Froehlichstr., Augsburg (Bavar-Germ.)
 383. F-ino Schneller, Maria, » » » » »
 384. de Luczenbacher, Janos, studento, 34, Guerickestr. Charlottenburg (Germ.)
 385. Meynkercken, F. 85, rue Pachéco, Bruxelles (Belg.)
 386. Lobbedez, Fernand, oficisto, Rue de Bapaume, Arras (Pas-de-Calais-Franc.)
 387. Collot, Hyacinthe, profesoro, 51, Rue de la République, Arras (Pas-de-Calais-Franc.)
 388. F-ino Fryer, Mary, Dalefield, Castle Hill Rastrick, (Brighthouse Angl.)
 389. Coppenet, Edm., instruisto, rue du Tribunal, Beaune (Côte-d'Or, Franc.)
 390. S-ino Coppenet, instruistino, » » » » »
 391. F-ino Horning, Ida, Augsburg (Bavar. Germ.)
 392. Karsten, Walter, oficisto, 43, Priessnitzstr., Dresden (Saks. Germ.)
 393. Robertson, Robert banka kasisto, 3, Earham Grove, Woodgreen-London (Angl.)
 394. F-ino Desserin, Gabrielle, lernejdirektorino, rue Michel Servet, Bourges, (Cher-Franc.)
 395. F-ino Bellamy, Dora, Fox Hill Lodge, Upper Norwood-London (Angl.)
 396. Maling, Arthur J., lingvisto, 28, Oakthorpe Road, Summertown (Oxford, Angl.)
 397. D-ro Dupont, Hubert, kuracisto, 101, rue d'Aix-la-Chapelle, Beyne-Heusay (Belg.)
 398. Bihain, Hubert, presisto, 3, rue de Chênée, » » » » »
 399. D-vo Besemer, hirurgiisto, 232, S. Albany Street, Ithaca, N. Y. (Usono)
 400. S-ino Besemer, » » » » »
 401. Collins, John D., legisto, S. Aurora Street, » » » » »
 402. Rhys Griffiths, G., 12, Kennison Drive, Grassendale, Liverpool (Angl.)
 403. Rhys Griffiths, Richard, » » » » »
 404. Challoner, E. L., kontoristo, 26, Cowley Hill Lane, St Helens (Lancash.-Angl.)
 405. Alker, R., kontoristo, Peasley Cross Lane, » » » » »
 406. Hartley, Richard, meblofaristo, Regent's Road, » » » » »
 407. S-ino Hartley, » » » » »
 408. F-ino Wagstaff, D., » » » » »
 409. F-ino Threlfall, Dora, 72, Hall Street, Southport » » » » »
 410. F-ino Lewis, W. J., 198, Weaste Lane, Pendleton Manchester » » » » »
 411. F-ino Giglot, Armande, Paleisstraat, 10, Antwerpen (Belg.)
 412. F-ino De Schepper, Valentine, Vredestraat, 18, » » » » »
 413. Farmer, George Noble, kalkulisto, 15, Queen Elizabeth's Walk, Stoke Newington, London (Angl.)
 414. S-ino Farmer, » » » » »
 415. F-ino Baird, Jane, instruistino, 95, Bellevue Road, Edinburgh (Skot.)
 416. Thomson, John C., bankisto, 42, St Andrew Square, » » » » »
 417. F-ino Calderhead, A. flegistino, City Hospital, » » » » »
 418. Davids, Edward James, civila oficisto, 55, Marchmont Road, » » » » »
 419. F-ino Forrest, H., flegistino, City Hospital, » » » » »
 420. Johnston, James T., 7, Viewforth Square, » » » » »
 421. F-ino Ramage, J. D., 16, Hawthorn Bank Terrace, Leith » » » » »
 422. F-ino Beveridge, Loris, instruistino, Maybank, Magdalen Park Road, Dundee » » » » »

Pri la nomo BELGUJO

La historio nur povas doni tre malprecizajn detalojn pri la unuaj popoloj, kiuj vivis tie, kie kuŝas la nuna Belgujo.

Pli bone konataj estas la Gaŭloj ⁽¹⁾ aŭ Keltoj, kiuj enmigris ĉi tien el Azio, kaj donis sian nomon al la vasta lando, limigita de la Oceano, la Rejno, la Alpoj kaj la Pireneoj.

Tiuj Gaŭloj estis pelataj trans la rivero Sejno (Seine) de potenca gento, alveninta el la orienta Eŭropo, kiu post ne-longe (3a centjaro antaŭ J. K.) enloĝis la tutan landon kuŝantan norde de la Sejno. La historiistoj donas al la almi-litintoj la nomon **Belgoj**, kies signifon oni retrovas en la antikva germana vortradiko *Belg, Bolg* = batalulo, bravulo.

Post kelkaj jaroj diversaj germanaj popolamasoj sin miksis kun la belga enloĝantaro; la Eburonoj ekzemple, estis ekskluzive germandevenaj. Kiam, 57 jarojn antaŭ J. K., la Romanoj aperis en nia lando, la preskaŭ tuta enloĝantaro estis germansanga. El ĝia idiomo ekestis la flandra lingvo, kiu nuntempe estas tiu de la plimulto el la Belgoj kaj intime rilatiĝas kun la nord-germanaj dialektoj.

Ĉar la Belgoj tre similis la Gaŭlojn, laŭ la staturo, la bluaj okuloj, la blondaj-flavruĝaj haroj kaj la vivmaniero, la Romanoj ilin interkonfuzis. Tio klarigas la famkonatajn vortojn de Cezaro: *Gallorum omnium fortissimi sunt Belgæ*. (La Belgoj estas la plej bravaj el ĉiuj Gaŭloj).

* * *

Sub la superregeco de la Romanoj la nomo Belgujo restis konservata, kvankam ĝi tute ne samrilatis al la regiono kuŝanta inter la limoj de nia nuna patrujo.

Sur la tiamaj landkartoj oni trovas du Belgandojn. *Belgica prima* kuŝis inter la Mozo, la Rejno kaj la la Mozelo, kaj jam enhavis en la 3a jarcento la urbojn *Colonia Agrippina* (Keulen-Cologne), *Augusta Trevirorum* (Trier-Trèves) kaj *Irolaunum* (Aarlen-Arlon). *Belgica secunda* etendiĝis ĝis la Sejno; je tiu tempo ekzistis *Corturiacum* (Kortrijk-Courtrai), *Tornacum* (Doornik-Tournai), *Bavacum* (Bavay) kaj *Cassellum Menapiorum* (Cassel).

La parto kuŝanta inter la Skeldo, la Seno (Senne), la Sambro kaj la Mozo estis nomata *Germania secunda*; en ĝi troviĝis la urboj *Aduatucum Tungrorum* (Tongeren-Tongres) kaj *Mosac Trajectum* (Maastricht).

* * *

Post la disfalo de la roma imperio, la nomo Belgujo malaperis kaj fariĝis intersekve *Franklando* kaj *Lotaringujo*.

(1) Laŭ la vortaro de Boirac kaj de Verax. En Christaller mi trovis *Galloj*, laŭ mi malpli aprobinda, pro la du literoj *L*.

Dum la feŭdala periodo ne ekzistis komuna nomo por niaj regionoj.

Al la imperiestro Karolo Va (1500-1558) ni ŝuldas la nomon *Nederlandoj*, kiun ni posedis kune kun niaj nordaj najbaroj, la Holandanoj. Post la unuiĝo de Utrecht (1579) kiu fakte disigis la nordajn provincojn de la sudaj, la nomo de nia lando estis *hispanaj* aŭ *katolikaj*, kaj en 1715 *aŭstria* Nederlandoj.

La humanistoj el la Renesanco ree konigis la nomon Belgujo kiu, ĉirkaŭ 1750 fariĝis pli kaj pli diskonata. Sur la dorsflanko de la tiamaj kupraj moneroj oni legas *Ad usum Belg. Austr.* La brabantia revolucio de 1789 sankciis ĝin; nia lando alprenis la nomon de *belgaj ŝtatoj* (Belgische Staten, Etats Belgiques). Van der Meersch estis momata la belga Franklin, kaj Van der Noot la belga Washington. Ambaŭ estis la ĉefoj de la revolucio, kies triumfo ne estis longdaŭra.

De 1795 ĝis 1815 niaj provincoj fariĝis francaj departementoj. Laŭ decido de la Viena kongreso (1815) ili estis kunigataj kun Holando, sub la nomo de *Reĝlando de la Nederlandoj*. La suda parto restis nomata Belglando, kontraste kun la norda, Holando.

En la jaro 1805 estis aperinta la unua *Histoire de Belgique*, verkita de J. B. Dewez, el Namur.

La nomo Belgujo tamen nur oficialiĝis post la revolucio de 1830, kiu donis al nia lando ĝian memstarecon kaj sendependecon. Rimarkinde estas, ke la franclingva adjektivo *belgique* fariĝis *belge*, kaj ke la titolo, alprenita de la unua landestro, ne estas *Reĝo de Belgujo*, sed *Reĝo de la Belgioj*.

AMATUS.

IO PRI GRAMATIKO

La gramatiko esperanta estas mallonga, facile lernebla. Ĝi sufiĉas por la plena uzado de la lingvo, sed ĝi ne ĉiam kontentigas lernantojn serĉemajn, kiuj deziras multe da klarigoj kaj etendaĵoj. Ili volas koni la kialon kaj la pravon de sia teorio lernita, kaj ili estas pravaj. Mi deziras esti utila al tiaj lernantoj, kaj tial intencas doni al ili kelke da lecionoj.

Hodiaŭ mi komencas donante klarigon pri la devenigado kaj uzado de l'vortoj.

La gramatiko diras: substantivo finiĝas per O; adjektivo, per A; verbo, per I; adverbo, per E. Ekzemploj: *amo, ama, ami, ame*; kaj serĉema lernanto tuj diras: *arbo, arba, arbi, arbe*; li tre bone komprenis la signifon de *amo, ama, ami* kaj *ame*; sed li tute ne povas kompreni la signifon de *arbi*, eĉ ne de *arbe*. Mi diras al li, ke la rekta devenigado estas ĝenerala, sed ke la vortoj ne ĉiuj estas uzeblaj, ke la vorto *arbi*, estas sensignifa. Malpli serĉeman lernanton kontentigus tia respondo, sed ne lin.

Kial *arbi* estas sensignifa, kaj *ami*, signifa? Li aŭskultu min atente; jen kelkaj principoj:

a) Ĉiu vorto havas neprecizan signifon, pli malpli ĝeneralan: ĝin devas precizigi, unuigi la komplementoj kaj vortoj kun kiuj tiu vorto formas propozicion kaj frazon. Ekzemple: kion signifas *granda*? ĉu tiu vorto havas la saman signifon en: *granda ĉevalo* kaj en: *granda muŝo*? Tute ne, vi diros, kaj vi tuj rimarkos, kvankam la gramatiko ne tion diras, ke *ĉevalo* kaj *muŝo* estas veraj komplementoj de *granda*, ĉar ili precizigas ĝian signifon. Vi ankaŭ tuj rimarkos, ke *granda*, kiel ĉiu adjektivo, havas nombron nelimigeblan da signifoj, kaj ke malplej klera homo ne trovas malfacilecon ĝin ĝuste uzi.

Rezonu same por substantivo: *homo*; por verbo: *lerni*; por adverbo: *tro*, kaj por ĉiuspecaj vortoj, kaj vi konkludos facile ke la « *kunstaro* » de vortoj devas precizigi ĉies signifon.

Kial kaj kiel? — Tial ke ĉiuj vortoj kunstarantaj en sama propozicio aŭ frazo, per sia interna nepreciza signifo, rilatas unu al alia aŭ al aliaj, kaj devas per tiuj interrilatoj prezenti klare kaj precize la volitan ideon.

Kio okazus, se ĉiu vorto havus ĉiam saman kaj precizan signifon? — Okazus 1^o ke ni bezonus senliman nombron da vortoj; 2^o ke saman ideon nur povus esprimi samaj vortoj. Konklude, ke la lingvo ne estus uzebla, ke ĝi estus nek fleksebla nek viva.

Opinianta, ke la serĉema lernanto bone komprenas mian rezonadon, mi esprimas jene la ĉefan lingvan principon: La kunstarado de vortoj en propozicioj kaj frazoj precizigu la signifon de ĉiu vorto, kaj igu la ideesprimon klara, ĝusta, kaj egala al la idenaskiĝo.

Sammaniere mi povas pravi ke « la kunstarado de propozicioj en sama frazo, de frazoj en sama ĉapitro, de ĉapitroj en sama libro, de ideoj en sama idearo sin devas interklarigi, interĝustigi, interprezigi, por fariĝi volita tuto.

Tio estas la granda leĝo nomita: rilatoj inter la ideoj. Al tiu leĝo gramatiko devas obei, ne ordoni; ĝi devas faciligi ĝian aplikadon, kaj ne povas ĝin kontraŭstari.

b) Tiu leĝo koncernas ankaŭ kaj regas tute la formojn, kiujn laŭcirkonstanco prenas la vortoj.

Ni ekzamenu la verbon: La verbo estas ago; *ami* estas ago, tiu ago nomiĝas nature *amo*. La verbo estas ankaŭ estmaniero; estmaniero estas kvazaŭ kvalito, kvalito karakterizata de ago, ĉar la ideon ago oni ĉiam rimarkos en *ami*; do la estmaniero esprimata en *ami* estos la adjektivo *ama*, kaj se la estmaniero koncernas ne objekton, sed agon kaj kvaliton, oni ĝin esprimos adverbe: *ame*.

Oni do vidas ke, de verba radiko, devenas nature kun signifo de sama ideo: substantivo, adjektivo, adverbo. La substantivo *amo* signifas nature la agon *ami*; la adjektivo signifas nature la

estmanieron *ami*; la adverbo *ame* signifas nature la estmanieron aŭ la farmanieron *ami*.

Ni ekzamenu la adjektivon: La adjektivo estas kvalito; *granda* estas kvalito, tiu kvalito nomiĝas *grando*. La kvalito povas sin prezenti al mia spirito dumaniere: 1^o apartenanta al io preciza: *la granda Dio*; tion oni esprimas esperante per sufikso *eco* kiu signifas *esto*: *grandeco de Dio*; la sufikso *eco* aldonas al la adjektivo verban ideon, (ĉar verbo estas estmaniero) kiun tute ne havas la adjektivo per si mem. 2^o kiel memekzistanta en io sen ideo verba de estmaniero: *la granda, la bona kiu kuŝas en Dio, la utilo kiu kuŝas en io. Ofte estas bona en malbona objekto.*

Oni do vidas ke, de radiko adjektiva, devenas rekte kaj nature substantivo, ne verbo, ĉar estas en adjektivo substantiva ideo, ne verba.

Ĉar adjektivo estas kvalito, kaj ĉar verbo kaj adjektivo mem povas havi kvaliton, la adjektivo povas sin prezenti adverboforme.

Mi ekzamenu la substantivon. La substantivo esprimas objekton, ne ideon verban de ago kaj de estmaniero, ne ideon adjektivan nek adverban de kvalito. Ĝi do povas formi rekte kaj nature nek verbon, nek adjektivon, nek adverbon respondantan al sia signifo: ĝi ne enhavas ideon de ago nek de kvalito. *La fino aperos en la proksima numero.* FRATO IZIDORO.

Rerigardo al la jaro 1910

de ARNOLD BEHRENDT

(El «Germana Esperantisto», januaro 1911)

Du faktoj — ŝajnas al mi — precipe karakterizas la esperantistan movadon dum la jaro 1910: la kompare al la antaŭaj jaroj pli multnombraj oficialaj aproboj de Esperanto, kaj la eniĝo de Esperanto inter la junularo. La 6an internacian kongreson de Esperanto, kiu okazis de la 14a ĝis la 20a de aŭgusto 1910 en Washington, ĉeestis oficialaj delegitoj el 16 landoj: Usono (armeo, maristaro), Ecuador, Luisiana, Hinuĵo, Hispanuĵo, Honduras, Meksikuĵo, Persuĵo, Rusuĵo, Urugvajo, Kostarika, Guatemala, Braziluĵo, Suda Karolina, Oregon kaj Florida. Kiel faris en 1909 la hispana ministro de la eksterlandaj aferoj, tiel ankaŭ Usono estis sendinta, laŭ diplomata vojo, invitojn al ĉiuj registaroj.

Ĉe la kongresoj en Barcelona (1909) Belgujo, Usono kaj Norvegujo, — en Dresden, (1908) Usono kaj Japanuĵo, — kaj en Cambridge (1907) Belgujo estis oficiale reprezentataj. Speciale rimarkinda estis la partopreno de la oficialaj personoj de la amerikaj ŝtatoj: la prezidanto de la oficejo de la amerikaj respublikoj,

samtempe prezidanto de la Ligo Esperantista, prezidis la 6an kongreson, kaj tiumaniere esprimis la aprobon de ĉiuj amerikaj respublikoj; tiu aprobo estis ankoraŭ sankciata per la akcepto de la kongreso en la oficiala palaco de la amerikaj respublikoj. La usona estraro mem montris sian simpatian kaj oficialan aprobon al la kongreso per la akcepto de la delegitoj, de la ŝtata sekretario de la Eksterlandaj Aferoj. En Washington la ministro de la Terkulturo tiel grave taksas Esperanton, ke li instruigas ĝin al siaj oficistoj. — En Meksikuĵo la ministro de la Publika Instruado sendigis al si oficialan raporton pri la Barcelona kongreso. — El la ŝtato Maryland estas sciigite, ke la leĝo de la 11a de aprilo 1910 enkondukas la laŭvolan instruadon de Esperanto en la normalajn kaj publikajn lernejojn. — La konsilantaro de Louhans (Francujo) aprobis la decidon, ke Esperanto estu enkondukata en la publikan instruadon. — La oficejo de la Publika Instruado en London permesis la instruadon de Esperanto en la vesperaj kaj teknikaj lernejoj, kaj dum la jaro 1908/1909 aprobis 33 kursojn.

En oficiala loko oni menciis Esperanton, nome en la saksa parlamento, kie la 28/4 kaj la 2/5 1910 deputato pruvis la grandan gravecon de Esperanto por la instruado kaj la komerco.

— La oficiala partopreno de multaj urboj sin montris per la konsiderindaj monhelpoj, donitaj al la grupoj por propagandaj celoj. Francujo okupas la unuan vicon: citindaj estas la urboj: Le Creusot, Toulouse, Condé, Armentières, Le Puy, Limoges, Saint-Omer, Toulon, Beaune, Rouen; el Hispanujo: Bilbao, Barakaldo; el Aŭstrujo-Hungaruĵo: Prag, Pilsen; el Germanujo: Hannover; el Belgujo: Antwerpen.

* * *

La eniĝo de Esperanto inter la junularo estas naturkonforma rezultato de la agema partopreno de la instruadestraroj; sed ankaŭ tie, kie ne ankoraŭ tiu partopreno estas konstatabla, la gvidantoj de la estonteco ekmoviĝas. Ne nur en popollernejoj, reallernejoj kaj gimnazioj, sed ankaŭ en fakaj lernejoj, teknikaj akademioj kaj universitatoj, laŭvola instruado estas akceptata, kiu tie ĉi kaj tie fariĝis deviga. El Germanujo estu citataj la jenaj urboj, kiuj produktis bonajn rezultatojn ĉe lernejoj: Deuben, Coswig e/S, Hannover, Magdeburg; plie Doehlen, Münster e/V. En multnombraj mezgradaj lernejoj en Brazilujo oni instruas Esperanton, en Rio de Janeiro en ĉiuj. Ankoraŭ estas citindaj la urboj Moskvo (reallernejo), Maastricht; en Aŭstrujo-Hungaruĵo: Pelč (gimnazio), Nagyvárad (same), Litovel (reallernejo); en Hispanujo: Terracassa, Vic; en Meksikuĵo: Tezintlan; en Nord-Karolina: Raleigh (publikaj lernejoj); en Bulgaruĵo: multnombraj mezgradaj lernejoj, ankaŭ en Dupnica (gimnazio) kaj Pleven (same). Specialan mencion meritas laŭ tiu vidpunkto Francujo: en Bordeaux oni instruas Esperanton kiel

devigan fakon ; en Lille oni instruas ĝin ĉe la elementaj kaj superaj lernejoj unuagradaj ; ĉiujare okazas ekzamenoj ; la lastan plenumis 397 el la 445 gekandidatoj (1910).

Sed ankaŭ ekster la lernejo oni sin okupas pri Esperanto en la lernantaj rondoj ; tion montras la *Unuiĝoj de junaj esperantistoj* en multaj urboj : ekz. Washington, Haag, Brisbane, Veronesch, Bochnia, Varsovio, Grosnij, Belgrad, Nisch, Bukaresti, Kopenhago ; Huttwil kaj Bautzen (Svisujo) kiuj naskiĝis dum 1910 ; plie la *Federacioj de junaj esperantistoj* en Francujo, Anglujo (nove fondita), Belgujo (same), Germanujo (same). En Anglujo estas ĉefe ĉe la *Boy Scouts* (junula gvardio), ke Esperanto trovis entuziasman akcepton.

Tiamaniere mi malproksimiĝis de la preparaj lernejoj. Mi reiru al ili kaj konsideru la fakajn lernejojn. Esperanto estas de nelonge instruata en la komerca lernejo de Madera en Prag, en la industria lernejo por knabinoj en la bohema urbo Ĉes Bedejovice (oficiale !), en la urba komerca lernejo de Hildesheim, en la privata komerca lernejo de Lodz kaj en la lernejo por junaj komercistoj de Bukaresti. Krom tio Esperanto trovis, parte per fondo de grupoj flanke de la studentoj aŭ per instruado prizorgata de la instituto, eniron en la jenajn lernejojn, akademiojn kaj universitatojn : seminario por instruistoj en Lübeck, imperiestra reĝa teknika supera lernejo en Wien, Viena komerca akademio, universitato en Belgrad, Ateneo por literaturo kaj sciencoj en Madrid, teknika lernejo Carnegie en Pittsburgh, universitatoj en München, Königberg e P, Leipzig, Prag, germana komerca akademio en Prag, supera komerca lernejo en Leipzig, Humboldt-akademioj en Breslaŭ kaj Berlin, libera supera lernejo en Berlin, teknika universitato en Charlottenburg, universitatoj en Moskvo, Charkow, Zagreb, Graz, Sofia ; veterinara instituto en Varsovio, teknika instituto en Kadis, imperiestra arbarinstituto en Petersburg, teknika komerca lernejo en Vejle (Danujo), teknologia instituto en Tomsk, teknika lernejo en Darlington, reĝa industria akademio en Chemnitz. La vigla partopreno de la studentoj ĉiulandaj ne mirigos, ke jam estas fonditaj du internaciaj studentaj unuiĝoj : *Ĉiostudenta asocio* (sidejo en Luhačovice, Moravia-Aŭstrujo), kaj *Universala ŝtudenta asocio* (sidejo en Budapeŝt).

Sur la teritorio de la instruado la blindulinstruado okupas tutspecialan lokon. Per tiu ĉi artikolo mi ne povas klarigi kial Esperanto estas bonfaro ĝuste por tiuj plej bedaŭrindaj inter la bedaŭrinduloj ; mi nur povas konstati, ke ĉiam pli kaj pli la blinduloj aliĝas al nia novado. Mi nur citas la blindulinstituton Vatra Luminoasa en Rumanujo, la blindulasocion Trigueros en Meksiko, la blindulinstituton de Klar en Prag, kie ĉie per la instruado de Esperanto lumo kaj ĝojo eniras la malhelan, nebulan mondon de niaj bedaŭrindaj proksimuloj ;

same estas en Christiania kaj Bukaresti. (1) En instruistaj rondoj mem la intereso por la movado kreskas. Antaŭ ĉio devas esti citata la *Esperanto Vereinigung von Lehrern höherer Schulen Sachsens* (Esperanto Unuiĝo de instruistoj ĉe superaj lernejoj en Saksujo) (sidejo en Riesa aŭ E), kiu celkonscie klopodas varbi la tutan instruanton.

* * *

Rimarkindaj progresoj estas efektivigitaj inter la komercistoj kaj industriistoj. Multnombraj gravaj firmoj publikigis katalogojn en Esperanto ; neeble estas nomi ĉiujn : la citado de la firmoj Heinrich Ernemann en Dresden (fotografaj artikloj), Hartmann & Braun en Frankfurt a.M. (elektra tekniko), Clément-Bayard en Levallois-Paris (aŭtomobil-kaj aeroplan-fabrikejo) sufiĉe pravas, ke grandaj firmoj alte taksas la valoron de Esperanto. La plej granda nombro de la komercaj ĉambroj en Hispanujo kaj Francujo favoras nian aferon, kelkaj el ili jam korespondas Esperante. El la germanaj komercaj ĉambroj sekvis la fervoran al Esperanto ekzemplon de la ĉambro en Bromberg tiuj en Kassel, Karlsruhe i B, Liegnitz kaj Schweidnitz. La *Internationale Gesellschaft zur Förderung des kaufmännischen Unterrichtwesens* (Internacia asocio por helpo en komerca instruadfako) en Bern (Svisujo) presigis la programon de sia 9a kongreso germanlingve kaj Esperante. — En Saint-Etienne estas fondita eksporta firma por hejmaj produktaĵoj, kiu uzas Esperanton por siaj eksterlandaj rilatoj. — La *Kaufmännischer Verein* (komercista unuiĝo) en Frankfurt a.M. dissendis cirkuleron, Esperante redaktitan, celantan interhelpon por trovi komercajn oficojn. — El Portland (Oregon) oni sciigis interesan fakton pri la utileco de Esperanto : la en Portland ekzistanta organizacio de la komercistaro publikigis malgrandan anoncon en *Amerika Esperantisto* kaj ricevis kvinfoje pli da petoj, ol post iu ajn alia anonco. Fine estu ankoraŭ citate, ke en Saksujo naskiĝis unuiĝo por la propagando de Esperanto en komerco kaj industrio, al kiu jam nun apartenas multnombraj gravaj firmoj.

* * *

Rilate al la interkomunikoj la jaro 1910 alportis kelkajn interesplenajn faktojn. En Aŭstrujo la ministrejo de la fer-

(1) Specialan mencion meritas la *Reĝa Blindulinstituto* de Woluwe (Brussel), kie Esperanto estas instruata de 1907. Inter la Woluwaj blinduloj ekzistas tre agema grupo ; ĝi havas bibliotekon de libroj en Esperanto, Braille presitaj kaj regule interkomunikigas kun siaj diversnaciaj samsortanoj. Ilia ĉefa gvidanto estas Frato Isidoro, kiu dum la Blindulkongreso de Napoli (1910) naskis grandan intereson pri Esperanto, kaj sukcesis skribigi sur la tagordon de la kongreso okazonta je la fino de nuna monato en Kairo la jenan temon : *Ĉu la alpreno de Esperanto kiel lingvon internacian por la blinduloj estas jam eksperimentata kaj, se jes, kiujn rezultatojn praktikajn oni povas jam montri ?*

vojaro atentigis siajn oficistojn pri la internacia lingvo Esperanto, kaj rekomendis al ili ĝian lernadon. — En Boxtel (Nederlando) fondiĝis grupo de fervojistoj por la studado de Esperanto. Citinde estas, ke la plimulto el ili interesigis je Esperanto pro diversaj informoj, esperantlingve petitaj de vojaĝantoj. — La oficejo por la interrilatoj kun eksterlandanoj en Budapeŝt, Augsburg kaj Godesberg akceptis Esperanton. — Dum la ekspozicio de mahomeda arto en München ekzistis informejo por esperantistoj. La prospektoj de la ekspozicio estis publikigataj ankaŭ en Esperanto. — Dum la tutmonda ekspozicio en Brussel, Esperanto estis uzata en la informejo pri loĝejoj. — En Aŭstralio la *Intelligence and Tourist bureau* (oficejo por informoj kaj turismo) uzas Esperanton, kun la permeso de la kompetenta ministro. — La sekcio pri turismo kaj higieno de la New-Zealanda registaro eldonis broŝuron anglalingvan kaj Esperantan. En la aludita sekcio la oficistoj estas devigataj lerni Esperanton. — La famkonata firmo Thos. Cook & Son en London organizas vintrajn sportojn por Esperantistoj en Champéry.

(La fino sekvas.)

Kun la afabla permeso de la aŭtoro
AMATUS
esperantigis.

NEKROLOGIO

Lev Nikolajevič Tolstoj
(1828-1910).

Rapide rajdas la mortintoj...

Tiu verso de la granda germana poeto revenis al mia memoro ĉe la pripensado al la granda geniulo, kiun la civilizita mondo antaŭ nelonge perdis.

Jam pli ol du monatoj pasis de tiam, kaj B. E. plenumas sanktan devon, rememorante — eble iom malfrue! — la ploratan malaperinton.

Ĉiuloke estas konata la ampleksa verkaro de la eminenta pensulo, kies idealo estis la homara progreso, la triumfo de la justeco kaj de la socia paco.

Ankaŭ por la esperantistaro la morto de Tolstoj estas granda perdo. Li estis varma kaj vigla apoganto de la Zamenhofa lingvo, pri kiu li iam diris: *La kvanto da tempo kaj da peno, kiun oni dediĉas al Esperanto, estas tiel malgranda, kaj la akirolaj rezultatoj estas tiel konsiderindaj, ke neniu povas heziti fari tiun pruvon.*

Tolstoj restis fidela al Esperanto ĝis la fino de sia vivo.

La esperantistoj pie konservos lian memoron.

La granda apostolo de la tutmonda interkonsento ripozu en paco!

AM.

PROBLEMOJ⁽¹⁾

10. **Ŝarado** : Vokalo — mordetema besto (radiko) — metalo.
Entute : Parolanto en publika kunveno.

11. **Intersanĝo de literoj**. — Avo — arta — rifo — diri — neĝo — tablo — logika — man — bopatro — eligi — tinio.

Formetu unu literon de la unua vorto kaj aldonu ĝin al la dua vorto. Same deprenu unu literon de la dua por doni ĝin al tria; — unu de la tria al la kvara, k. t. p. La litero elmetita de la lasta vorto estos donata al la unua. Poste anagramigante, vi formos novajn vortojn, kiuj signifos : Poseda adjektivo — pli ol sufiĉa — agi — ago de gajeco — malhelpi — ŝipeto — altiri al iokorpaj muskoloj — ligna vegetaĵo — moviĝi sur glata supraĵo — parazito.

12. **Logaritmo**. — La homa 72189 ne ŝovas sin, kiel 4519; sed, kiel potenca 5769 ekfluganta en la 42491, tiel ĝi mirinde alteniras.

En kiu ajn fako, ĉu scienca, ĉu 4268785, ĉu arta k. t. p. 12189 povas certe 566978 la homojn ol la sincera esplorado de la vero.

6878 signifas : fiksi per ŝnuro, 53 figure, per kiu ajn 678769. De tio ŝajne devenas la popola diro pri tiu kiu edziĝis « li metis la ŝnuron ĉirkaŭ sia kolon ».

Sufiĉas, ĉu ne? por ke vi trovu sen dolora 123456789 la solvon de tiu ĉi logaritmo.

PLANTANO.

DIVERSAJ INFORMOJ

Belga Esperantisto. La du unuaj jarkolektoj de nia gazeto estas aĉeteblaj ĉe la sekretario de la redakcio, S-ro Frans Schoofs, 45, kleine Beerstraat, Antwerpen (rue de la Petite Ourse, Anvers). Prezo: 1908-1909, Fr. 4.50; — 1907-1910, Fr. 4.25.

Urbo Antverpeno, Publika popola biblioteko. La publiko jam povas disponi la esperantajn librojn, pri kiuj ni parolis en la januara numero de B. E. La katalogo de la biblioteko enhavas 80 verkojn en Esperanto, el kiuj la plimulto estas literaturaj. Ĝi ricevas plie la jenajn revuojn: *Belga Esperantisto*, *Lingvo Internacia* kaj *La Revuo*. Ĉiuj personoj,

(1) Oni sendu la solvojn, antaŭ la 25a de marto 1911, al S-ro FRANS SCHOOLS, sekretario de la Redakcio, 45, Kleine Beerstraat, Antwerpen, (45, rue de la Petite Ourse, Anvers.) Prefere skribitajn sur poŝta karto.

En la lasta numero de la 3a jarkolekto estis publikigataj la nomoj de la solvintoj. Onis povas respondi pseŭdonime.

Belaj premioj estos aljuĝataj.

kiuj loĝas en Antverpeno de almenaŭ unu jaro, kaj kiuj estas pli ol dek kvinjaraj, povas pruntepreni librojn.

La biblioteko estas malfermata ĉiujn labortagojn de la 10a ĝis la 16a; sabate de la 9a ĝis tagmezo.

Internacia Ligo de Poŝtistoj. — Tiu ligo, fondita la 22an de januaro en Dresden, celas kunligi ĉiujn esperantistajn kolegojn de ĉiuj landoj, ĉar per speciala ligo de Poŝtistoj la Registaroj pli volonte donos al ili la permeson porti sur sia uniformo la Esperantan signon. La « I. L. d. P. » eldonos de post januaro specialan presitan gazeton kun titolo « Poŝta Esperanto », en kiu ĝi intencas publikigi ĉion, kio interesas Esperanton kaj la Poŝton. Precipe ni petas bin informi pri ĉiu speciala kurso por poŝtistoj kaj citi al ni la nomojn kaj detalajn adresojn de ĉiuj poŝtistoj sciantaj Esperanton, por ke ni povu ilin gajni por nia ligo. Kolegoj de ĉiuj ŝtatoj aliĝu tuj nian ligan kaj postulu senpage nian regularon kaj provnumeron de nia ligorgano de S-ro PAŬLO SCHMIDT, Dresden, Herbertstr. 23.

BELGA KRONIKO

Ni insiste petas ĉiujn grupojn kaj ankaŭ la izolitajn samideanojn, ke ili sendu, kiel eble plej akurate, informojn pri sia societo aŭ ĉiuspecajn sciigojn pri Esperanto, plej malfrue la 25an de ĉiu monato, al la Direktoro de « Belga Esperantisto », 25, Arendstraat (rue de l'Aigle), Antwerpen (Anvers). Tre dankeme nia redakcio ankaŭ ricevos la ĵurnalojn, enhavantajn artikolojn pri nia movado.

ANTVERPENO. — Inter la studentoj de la Supera Instituto de Komercio komenciĝis la esperantista movado. Nia pola amiko, S-ro Kazimiro Rybezynski, de Varsovio, organizis la 15an de decembro sukcesplenan kaj interesegan paroladon, faritan de nia bone konata samideano, S-ro Prof. Fr. Swagers, kaj, de la 7a de januaro malfermis kurson en la kunveno de la pola societo de studentoj. Dekkvino da liaj diversnaciaj kamaradoj ĉeestas la instruadon.

Ni deziras plenan sukceson al la laŭdinda entrepreno de nia simpatia samideano Rybezynski kaj esperas ke liaj klopodoj konduku al la organizo de konstanta kurso de Esperanto en la antverpena komerca universitato.

— **Ĉe la oficioj.** — La 21an de januaro S-ro leŭtenanto N. Bernaert parolis antaŭ la oficioj de la milita veturilistaro pri la temo: *La internacia lingvo kaj la armeo.*

La sukceso de la oratoro estis tre granda: liaj kamaradoj tre ege interesiĝis pri la Zamenhofa lingvo, kiujn kelkaj el ili, ĝis nun skeptikaj, baldaŭ eklernos. La parolinto disponis la librojn, broŝurojn, gazetojn de de la rondiranta ekspozicio de la B. L. E., kaj tiel fakte pruvis la grandan disvastigadon kaj la konstantan kreskadon de la esperantista movado.

— **Ce la profesora societo « Regentenkring ».** Jaŭdon, la 12an de januaro ĉe la profesora societo « Regentenkring » S-ro Prof. Ad. Finet faris tre interesan kaj lertan paroladon pri Esperanto kaj la esperantista movado. Krom la ĝeneralaj konsideraĵoj pri la nepra utileco de helpa lingvo internacia, kaj la interesa komparo de diversaj lingvaj projektoj, —

krom kelkaj konvinkodonaĵoj ekzemploj pri la facileco kaj belsoneco de Esperanto, S-ro Finet konsideris la esperantistan movadon laŭ la pli speciala vidpunkto de la instruisto, de homo, kiu ĝis nun devis oferi al la studado de fremdaj lingvoj multan tempon, monon, laboron, kiujn li pli efike estus dediĉinta al scienca aŭ pedagogia studado. Li atentigis siajn kolegojn pri la granda ŝparo de tempo kaj la simpligo por la instruado, se, krom la gepatra lingvo, nur estus instruata unu helpa lingvo internacia. La parolinto ankaŭ anoncis la 7an internacian kongreson de Esperanto kiu baldaŭ okazos en Antverpeno, kaj instigis siajn aŭdantojn al la tuja lernado de Esperanto, por ke ili ĝuu la plezuron tiam interkonatiĝi kun siaj eksterlandaj kolegoj kaj fari al ili indan akcepton.

Oni varme aplaŭdis la sindonan paroladinton.

— **Fervoro.** — Tiu ĉi juna, sed jam tre agema grupo regule ĉiumarde kunvenas en la Supera Unuagrada Lernejo (strato Oudaen), kiun la Urbeŝtaro afable metis je ĝia dispono. La instruado estas farata de nia vigla kaj simpatia samideano S-ro L-to Bernaert. Ĉiu leciono enhavas du partojn: unue oni klarigas la ĉapitrojn de la bonega libreto *La ĉiutago vivo*, kaj fine oni legas kelkajn paĝojn el la teatraĵo *Kantje*.

Antaŭ kelkaj semajnoj la grupo organizis en la *Hôtel Métropole* brillan festmanĝon, kiun ĉiuj Fervoranoj ankoraŭ kun ĝojo memoras.

Preskaŭ ĉiuj membroj de *Fervoro* jam aliĝis la Sepan Universalan Kongreson de Esperanto: ĉiuj abonis nian revuon.

— **La Verda Stelo.** — *Ĉiujara ĝenerala kunsido.* — La ĉiujara ĝenerala kunsido de la Verda Stelo, okazinta la 25an de januaro 1911 en la grupa sidejo « Zamenhof » sub la prezidanteco de S-ro Frans Schoofs, estis multnombre ĉeestata.

Multe aplaŭdata estis la raporto pri l' agado de la grupo dum 1910 tial ke pri tiu agado oni povas sufiĉe kontentiĝi.

Festena vespermanĝo estos prizorgata por rememorigi la 28an de januaro 1911 la kvaran datrevenon de la grupfandado.

Tre interesplenaj interparoladoj okazis pri la 7a internacia kongreso de Esperanto, pri la 3a belga kongreso esperantista kaj pri loka propagando.

Post elekto de kvar komisarioj la grupo decidis doni premion de fr. 50. en la literatura konkurso de la 7a kongreso. Je la finiĝo de la kunsido la vizito de kelkaj anoj de A. G. E. tre ĝojigis la ĉeestantaron.

La kunsido finiĝis je la 23a h. kun ludado fortepiana de « l' Espero ».

— La festeno de la grupo, okazinta la 28an de januaro bone sukcesis, kaj la ĉeestantaj ĵurnaldelegitoj faris raporton favoran en siaj gazetoj.

Dum la festeno oni havis belan muzikprogramon.

Je la fino la prezidanto dankis la ĵurnaldelegitojn pro ilia ĉeestado kaj pro la helpo de la gazetoj kaj esprimis la esperon ke la ĵurnalaro ankoraŭ multe estu favorema al nia movado, precipe okaze de la estonta internacia kongreso.

La « Suda Lumo » sendis afablan gratulleteron al la fervora grupo « La Verda Stelo » kaj S-ro O. Van Schoor, prezidanto de la A. G. E. kun du aliaj membroj vizitis la festantan grupon la vesperon de la festeno; unuvorte, la dirita festeno ne nur estis grupa agrablajo sed ankaŭ efika priĵurnalala propagandilo.

— La grupanoj estas insiste petataj ĉeesti la ĉiumonatan ĝeneralan kunvenon, kiu okazos merkredon, la 22an de februaro, je la 8 1/2 a vespere en la kafejo « Zomerhof », 30, Dageraadplaats (Place de l'Aurore).

Tagordo: 1. Raporto pri la antaŭa kunveno. — 2. Propagando. — 3. Novaj kursoj. — 4. Literatura konkurso de la VIIa kongreso. — 5. Le 3a belga kongreso. — 6. La 7a internacia kongreso. — 7. Interesaj informoj.

BOOM. -- Merkedon, la 11an de januaro, okazis la ĉiujara ĝenerala kunveno de la tiea grupo.

S-ro Jul. Clerbaut ĝin prezidis. Post bonveno kaj danko al la ĉeestantaro li esprimis koran saluton al S-ro Alf. Mathijs, fondinto de la grupo, kiu, kvankam loĝante en Gento, restis membro de la societo kaj kiu, nunmomente certe, se ne korpe, almenaŭ spirite, estas kun siaj Boom'aj amikoj. La simpatia prezidanto ĝoje konstatas, ke la grupo ĉiam kreskas kaj progresadas.

S-ro J. Verbruggen klarigas la regularon de la grupo al la novuloj kaj S-ro K. Bal, kasisto, konigas la financon staton.

La plej interesa parto estis la legado de la agadoj de la grupo dum la pasinta jaro. Tiu raporto, verkita de la sindona kaj nelaciĝebla sekretario, S-ro Kam. Babilon, estas hektografita kaj disdonata al ĉiuj grupanoj.

Ni ĉerpas el ĝi ke la grupo enhavas 29 membrojn kaj malfermis, la 9an de decembro, novan kurson (la 1an de ĝia ekzistado), kiu estas la plej regule ĉeestata ĝis nun. La grupanoj kunvenas ĉiumerkrede, je la 9a vespere, en la *Hôtel de l'Univers*; dum la lasta tempo paroladetoj de la membroj igis tiujn kunsidojn tre interesaj. Intersekve aŭdigis sia F-ino Maria Verbruggen, S-roj Ernest Roscam, Jules Clerbaut, Karel Struyf, Alfons Spillemaekers, Jan Verbruggen k. c. Krom tio, diversaj membroj renkontiĝas ĉiusabate je la 9a vespere en la sama kunvenejo por perfektigi en la praktika uzado de Esperanto.

